

**ANTAŬPROJEKTO  
ESPERANTO  
PRAGMATIKA**

---

**PRAKTIKA UZADO DE  
LA INTERNACIA LINGVO  
POR TEKNIKISTOJ,  
INĜENIEROJ KAJ  
DIVERSAJ FAKULOJ**

Tradukado

Trejnado

Disvastigado

Atingo de revoj kaj celoj

**Brazilo**

**Aprilo 2002**

# INDEKSO

<b>CELO .....</b>	<b>3</b>
<b>RAZONO .....</b>	<b>3</b>
<b>IDEOLOGIO .....</b>	<b>6</b>
<b>PAŜOJ.....</b>	<b>9</b>
1. TRADUKOJ DE TEKNIKAJ NORMOJ.....	9
2. TRADUKOJ DE TEKNIKAJ LIBROJ .....	10
3. KONTAKTO KUN PRESEJOJ .....	10
4. TREJNADO DE PROFESIAJ PAROLANTOJ .....	11
<b>LEKSIKONO .....</b>	<b>12</b>
<b>KONKLUDO .....</b>	<b>12</b>
<b>ALDONO – PROPONATA KRONOGRAMO POR LA ANTAŬPROJEKTO .....</b>	<b>15</b>

# ANTAŬPROJEKTO ESPERANTO PRAGMATIKA

*“Esperanto estas afero nek de familio, nek de iu klubo, nek de grupo, nek de nacio, nek de ŝtato, nek de religio. Plue, la lingvo internacia ne estas celo por si mem; ĝi devas esti instrumento de la granda filozofa kaj homarana ideo de la iniciatinto de la lingvo.”*

Louis C. Zaleski-Zamenhof  
Mesaĝo prononcita okaze de la malfermo de la 72a UK de Esperanto

*“(…) Ne, karaj geamikoj, ni ne devas fuĝi el la mondo sed vivi en ĝi kaj al ĝi proponi nian solvon, nian vizion kaj la valorojn, kiujn ni efektive sukcesas praktike realigi.”*

Renato Corsetti, Prezidanto de UEA  
Novjara mesaĝo “Do, rekte kaj kuraĝe”, Revuo Esperanto, no. 1143, p. 6.

## Celo

Diskonigi la efikan praktikan valoron de Esperanto per tradukoj de modernaj teknikaj verkoj kaj preparigo de profesiaj prelegantoj kaj instruistoj en ĉiuj profesiaj temoj.

La objekto estas la disvastigo de la lingvo internacia kiel ilo, kies efika valoro kiel rapida instrumenta komunikilo estos montrata.

## Razono

Tiu antaŭprojekto konsideras, ke la disvastigado de Esperanto bazita sur sia plej nobla ideologio (nur unu lingvo por la mondo), jam estas praktikata en la mondo ja multe. La problemo estas: ju pli oni parolas pri ideologio, des pli la homoj sentas, ke Esperanto malproksimiĝas el la praktika vivo kaj des malpli ili malinteresiĝas pri ĝi.

Al ni, kiuj jam vivas Esperanton, tiu ne sonas veron, sed fakte, ni jam vivas kaj sentas, ke en la moderna mondo imperas la rapideco de informoj; Interreto pruvas tion. Pro tial estas, ke la Latina lingvo jam ne povas regi kiel internacia lingvo; oni elspezas pli ol sep aŭ ok jarojn por efike ĝin lerni, kaj tiom da tempo la homoj ne plu havas.

Alia fakto, kiun ni ne povas forgesi, estas, ke la moderna mondo ne multe interesiĝas pri ideologion. Ĉiuj laboroj sur nia planedo devas enfokusigi efikajn kaj rapidajn rezultojn. Kiam temas pri ideologio, la tempo estas ĉiam perdita, kiun nun oni ne povas plu perdi.

Esperanto naskiĝis en 1887; sin farante 115 jaraĝa. Ekde tiam, ĝi estas ideologie disvastigita. Fakaj asocioj ekzistas, kiuj fiere klopodas uzi Esperanton en iu pli praktika afero. Tamen, ilia laborado estas disvastigi la Internacian Lingvon per siaj profesiaj, artaj aŭ religiaj temoj, kiujn ili fakas.

Tiu Antaŭprojekto celas disvastigi la profesion, la arton aŭ la religion, sed uzante Esperanton kiel efika ilo. Ĝi fariĝos altnivela disvastigado de informoj kun teknika alta kvalito, ne rekte tuŝante la ideologion, malgraŭ tiu ideologio ĉiam ekzistus implicite.

La ekzemplo, per kiu tiu Antaŭprojekto komencas labori, estas la instruado kaj lernado de la Angla lingvo. Kiam homoj volas lerni ĝin, neniu fuŝdiras. Ĝuste pro tio, ke la Angla estas lingvo, kiun oni povas registri en niaj Vivrezumoj (*Curricula Vitarum*), ĉar oni profitas tion farante.

Aliflanke, kiam homoj volas lerni Esperanton, ĉiuj mokas; ili diras, ke Esperanto estas lingvo, kiun personoj ne ankoraŭ scias uzi por profiti, ĉar nur revuloj ĝin parolas. Se ni bone meditos pri tiu afero, ni fatale konstatos, ke ĝi estas preskaŭ vero.

La progreso de Interreto montris, ke la profesiuloj ja ricevas utilon el ĝi. Tiuj, kiuj regas du aŭ tri lingvojn, ĉefe la anglan lingvon, povas serĉi iun ajn informon, kiun ili necesas, nur ŝaltante la komputilon kaj alligante al la TTT.

Sed la plejparto de la homoj ankoraŭ ne parolas aŭ scipovas Esperanton. La vero estas: tiu, kiu ĝin ne konas, ne volas koni, pro tio, ke Esperanto, kiel jam supre menciita, ne profesie utilas al ili.

Bedaŭrinde, en Esperanto, oni ne trovas facile multajn da teknikaj verkoj – administraciaj, ekonomiaj, entreprenaj, i.a. – disponebla al ĉiuj, kiuj ilin necesas.

Aliflanke, se tiaj verkoj ekzistus en la lingvo Esperanto, la profesiuloj de ĉiaj profesiaj areoj ekvidos la efikan praktikan utiligeblon de la Lingvo Internacia. Ili, do, komparos la tempon konsumitan aŭ konsumotan dum la lernado de nacia lingvo, ekzemple la angla, la franca, la germana aŭ la japana, kun la lernada periodo de Esperanto. La rilato kosto-profitigo montros al ili, ke Esperanto estas preskaŭ nekosta, kaj necesas pli malmultan tempon por lerni.

Malgranda komparo: se iu entreprenejo volus investi en kurso de angla lingvo por unu teknikisto aŭ inĝeniero, ĝi eble devus investi ĉ. US\$ 50,00 po monato, en ĉ. 4 jaroj de lernado de la lingvo. Tio fariĝus:  $US\$ 50,00 \times 12 \times 4 = US\$ 2.400,00$  po nur unu profesiulo!

Nu, se tiu sama entreprenejo investus en altnivela kurso de Esperanto por tiu sama profesiulo, ĝi devus investi ankaŭ ĉ. US\$ 50,00 po monato, sed nur por 3 monatoj (maksimume)! Tio, do, fariĝus:  $US\$ 50,00 \times 3 = US\$ 150,00$ . Ĝi havus ŝparon de ĉ. US\$ 2.250,00!!!

Se en tiu entreprenejo laboras 50 altnivelaj profesiuloj, kiuj devos interkomuniki kun la mondo por koni teknologiojn kaj interŝanĝi informojn, kaj se ili efike kaj profesie uzus Esperanto en siaj rilatoj, ĝi havus ŝparon de US\$ 112.500,00!!!

Nun la demando: kiel komenci uzi Esperanton kiel efikan ilon de interŝanĝo de profesiaj informoj?

Multaj da manieroj jam ekzistas. Ekzemple: la vorto “Esperanto” estas uzata de S-ro Luis R. Cancel, usonano, por fari tradukaĵojn kaj konstrui hejmpaĝojn – kaj tio estas mirinda – uzante la Esperantan filozofion. Tio signifas, ke li surbazaĵas je fakto pri la efika ilo por komunikigi la diversajn popolojn, kiun reprezentas Esperanto, kaj facile solvi la problemo de la interkomunikado. Per tiuj ideoj, li estras entreprenon en Usono, kiu nomiĝas *Esperanto Internet Services* ([www.esperanto.com](http://www.esperanto.com)) ekde 1995. Vidu malsupre frazojn tiritajn el lia hejmpaĝo en hispana lingvo:

*EIS fue fundada por Luis R. Cancel, tomando en cuenta el espíritu del idioma Esperanto, para facilitar comunicación entre individuos de diversas culturas y nacionalidades. La naturaleza global en la red mundial Web permite un acceso instantáneo a información localizada en los servidores al rededor del mundo. Sin embargo, este acceso fácil a información no facilita comprensión. Los idiomas todavía dividen el mundo y limitan la habilidad de entenderse el uno al otro y poder compartir información útil.*

Ĉu tiu estus misuzadon de Esperanto? Tute ne. Verŝajne, EIS ne uzas Esperanton nek por tradukado, nek por eĉ prezenti sian propran hejmpaĝon. Sed ĝi uzas la nomon, kiu, per si mem, ne estas ies propraĵo, sed ĉies. Kaj tio enhavas bonan punkton: S-ro Cancel helpas la disvastigadon de profesiaj aferoj uzante Esperanton (aŭ almenaŭ la nomon). Por la celo de tiu ĉi antaŭprojekto, tiu jam sufiĉas.

Alia maniero estas uzi Interretajn diskutlistojn por disvastigi la profesiajn agadojn per Esperanto. Tiaj listoj jam ekzistas, kaj unu ekzemplo estas listo kunordigata de S-ro [Santiago Alvarez](#), kiu nomiĝas “Per-Esperanto-Komerco”, kaj ni libere kaj laŭlitere montros ĉi tie lian mesaĝon okaze de la malfermo de la jaro 2002, montrante ekzakte tion, kion la Antaŭprojekto volas realigi (ni nur libere ŝanĝis la konsonantojn ch, gh, sh, ú al ĉ, ĝ, ŝ, ŭ, respektive).

*Mi kredas ke la venonta jaro difinos tre klare ĉu komerco lige kun esperanto taŭgas aŭ ne por la homaro. Kiuj kredas ke optimas uzante la internacian lingvon por perfektigi konojn pri komerco kaj por uzi la lingvon por efektiviĝi negocojn havas en ĉi tiu komerca forumo la eblecon realigi la ideojn kaj pioniri novajn kaj efikajn rimedon por pliboniĝo de la monda komercado. Ni ne devas malprofiti la bonŝancon ekkomenci pruvi ke pli ol projektoj fariĝas realiĝoj kaj ne poste sed nune, tuje.*

*Pro tio, tiuj, kiuj kredas ke la celoj plenumiĝos devas – mi pensas –, agi dum la ekkomencanta jaro, dediĉante tempon, kaj investante kapitalon por la venko ne nur de bonega komercado, sed de tuja disvolviĝo de esperanto kaj kresko de la esperantomovado.*

*Multaj el ni ne estas spertaj teoriistoj aŭ profundaj esplorantoj de komerco sed ni scias ke en Esperantio aŭ Esperantujo estas spertuloj, homoj kapablaj, kune kun la praktikaj komercistoj, krei kaj apliki superajn teoriojn por nia komuna entrepreno. Ni fidu je ili.*

*Certe, multaj el ni, povas kaj kelkfoje eĉ devas ekkomenci ne gravas ke ne grandan komercadon. Ankaŭ iuj el ni havos simpatiajn kaj nekredoblajn spertojn interŝanĝante objektojn, aĉetante aŭ vendante negrandskale kaj elpensante sistemojn utilajn por ni. Kaj per tiuj aspektoj farante la historion de esperanto per komerco kaj komerco per esperanto.*

*Grava kontribuo por la celo estas krom legi atente la mesaĝojn aperantajn en nia listo, skribi, skribi kaj skribi. Tio signifas ke ni povos kune grandigi la riĉecon de nia listo.*

*Feliĉan kaj optimistan komercadon por la nova jaro!!*

Tiuj supraj manieroj devas esti bonvenataj kaj ili estas en la korekta vojo por farigi nian Esperanton pli praktika kaj pli pragmatika.

Unu el tiuj manieroj, al kiuj ni volas alligi, estas la teknikaj verkoj. Ni ekkomencos nian ekspozicion per supozicio: se verkoj modernaj tradukitaj al Esperanto, kun alta kvalito, ekzistas, la personoj eble vidos, ke Esperanto ankaŭ prizorgas la profesion aferon.

Plue: se profesiuloj de aliaj landoj ekzistas, kiuj povas paroli aŭ fari prelegon pri teknikaj temoj en industrioj, komercoj ktp. en Esperanto, ni finfine provos, ke la Internacia Lingvo estas, krom ideologia afero, praktika kaj pragmatika ilo por konkeri altnivelajn rangojn kaj altnivelan kulturkapablon.

Se tiuj supozicioj fariĝus realan aferon, ĉiu profesiulo volonte, fiere kaj decideme skribos en siaj individuaj Vivrezumoj, ke Esperanto estas unu el iliaj regataj lingvoj.

---

## Ideologio

La fakto, pri kio ni estas esperantistoj, estas tial ĉar ni parolas la lingvon, kiun Zamenhof iniciatis 115 jaroj antaŭ. Tio estas ja prava, sed ne tute.

La Markizo de Beaufront kaj Zamenhof iam diskutis pri la idealisma kaj komercisma aferoj de la Lingvo. Beaufront asertis, memfidele, jam en la komenco de la 20a jarcento, ke Esperanto estas nur lingvo por ke la komercistoj ĝin uzos en siaj internaciaj komercrilatoj, kaj nenio alia.

Bedaŭrinde, la Markizo aldonis tiun lastan frazon ("kaj nenio alia"), ĉar ĉiuj esperantistoj, ankaŭ tiuj, kiuj militas du- aŭ triflanke, ankaŭ tiuj, kiuj emas konfuzi ĝin kun la Spiritisma Movado, aŭ kun Oomoto, aŭ kun Ba'ha'i, ankaŭ la anarkiistoj, la fervojistoj, la radioamatoristoj, fine, ĉiu esperantisto estas esperantisto ĉar li trovis en Esperanto aferon neniam oferatan en iu ajn lingvo de la mondo, nome la frateco, la egaleco kaj la libereco por esprimo.

Dum sia malferma diskurso de la Universala Kongreso de 1906, en Ĝenevo, Svislando, Zamenhof diris, ke "esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Esperantisto sekve estas ne sole tiu persono, kiu revas unuigi per Esperanto la homaron, esperantisto estas ankaŭ tiu persono, kiu uzas Esperanton ekskluzive por celoj praktikaj, **ESPERANTISTO ANKAŬ ESTAS PERSONO, KIU UZAS ESPERANTON POR GAJNI PER ĜI MONON**, esperantisto estas persono, kiu uzas Esperanton nur por amuziĝadi, esperantisto fine estas eĉ tiu persono, kiu uzas Esperanton por celoj plej malnoblaj kaj hommalamaj" (nia pliakcentigito).

Sekve, li mem donis al ni klaran admonon pri la afero: "Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!".

Do, estas tre videbla, ke la iniciatinto mem, diris, ke ekskluzive la persono, kiu agas en komerco kaj uzas la Lingvon por praktikaj celoj estas Esperantisto. La kondiĉo, por ke tiu persono sekvus sin nomiĝata kiel (veran) esperantiston, estis tre klara: **NENIAM**, en ia ajn okazo, ŝ/li devus forgesi la fratan idealon, kiu endas unuigi la personojn, malgraŭ la vojoj tra kiuj tiu celo devas esti atingita.

Kiam la Markizo ekkriis tiujn vortojn, la reago de Zamenhof estis tuja: "Neniam! La komercistoj uzu ĝin laŭ siaj vojoj, sed Esperanto estas nepre ligita al idealismo, per kiu ni devas batali: unuigi la homojn super la limoj, fini la batalojn kaj la malamojn, **IGI LA HOMOJN PLI FELIĈAJ**. Tiu estas la vera celo de Esperanto, **SIA INTERNA IDEO**".

Kaj la pola majstro estas korekta unufoje plu: la komercistoj/pragmatikistoj uzu ĝin laŭ siaj vojoj, sed neniam forgesu la internan ideon, per kiu Esperanto naskiĝis, vivas kaj prosperas. Arogantaj personoj, same kiel la Markizo, ne scias distingi la bonan uzadon de lingvo por unuigi la homojn per la plej diversaj manieroj, kiujn tiu lingvo oferas.

En tiu ĉi Antaŭprojekto, la ĉefa temo estas la praktika uzado de la Lingvo Internacia por atingi komerce, finance kaj rekte multajn da homoj, kiuj pensas, ke Esperanto nur vivas per ĝia idealismo. Ili ne eraras entute, kaj alia observo estas rigardinda tie ĉi: la amatorismo en Esperanto.

La esperantistaro, ĝenerale, ankoraŭ ne scias esti profesia samnivele al la disvastigado de la plej popolaj naciaj lingvoj. Tiu estas ja fakto.

Ekzemple, ni menciuj la kvaliton de niaj materialoj. Ĉu ili estas kompetemaj en la merkato? Ĉu ekzistas iun forton al tiu direkto por ke ni havu altnivelajn kvalitajn materialojn, ne nur pedagogiajn, sed teknikajn kaj fakajn?

Ĝenerale, la respondo estas ne. Esperanto ankoraŭ ne havas la saman karakterizon. Eĉ se ni parolas pri la frateco kiun vivigas Esperanton por ni, tio pli graviĝas, kiam tiu sama persono nin demandas: "Kion ĝi alportos al mi profesie? Ĉu mia Vivrezumo pliboniĝos se mi scios Esperanton?". Nu, ni ĉiuj bone scias, ke la respondo estas jes, sufiĉe ke ni povus korespondi kun la esperantistaro de tuta mondo, por ke ni povos impulsigi la interŝanĝon de profesiaj ideoj kaj, do, io tre bela okazos: la profesia flanko sin plibonigas, sed ankaŭ la senton pri frateco pliboniĝas! La idealismo ne estas forgesata; ĝi nur estos atingita per alia vojo.

Tamen, kiel profesiuloj, ni ne povas ignori, ke la naciaj lingvoj konkeris siajn spacojn ĝuste pro tio, kion ili ofertas profesie kaj komercie. Post pli ol 100 jaroj ekde la apero de Esperanto, ni ankoraŭ vidas, ke la homoj volas, kiel efikan pruvon por tiom da tempo elspezita dum lernado de fremda lingvo, plibonigon en siaj *Curricula Vitae*, en siaj karieroj, kaj ĉiam finiĝante en siaj poŝoj.

Sen forgesi nian idealismon, se ni komencus agi pli profesie, serĉante investadojn, konstruante subtenajn fondaĵojn, kaj kreante teknikajn kaj fakajn materialojn kun altnivela kvalito en Esperanto, la homoj estos atingita rekte tien, kie al ili estas pli sentema: la poŝo. Kaj se ni pruvos al ili, ke lerni kaj uzi Esperanton, kvankam por celoj praktikaj, ni gvidos ĉiujn homojn al ili pli frata, pli egala, pli libera komunumo. La frateco kaj idealismo, kiuj donas la internajn direktojn de Esperanto estos pli vivanta ol iam ajn antaŭe.

Sed sekvi kiel amatoroj en Esperanto ne povas esti plu permesata. Aliaj lingvoj povas esti komercaj sukcesoj, sed ĉiuj ili estas frivolaĵoj, ĉar ili ne enhavas la saman senton, kiun Esperanto posedas. Ni devas pensi profesie; pensi ne kostas monon kaj involvas nur la enfokusadon de celoj. La sento pri frateco kaj la idealismo, kiu impulsas la Lingvon, daŭre vivos.

Tiu ĉi Antaŭprojekto celas igi la mondon iom pli frata kaj egala, sed per la vojo kiun ni jam konas, nome la praktika utiligado de la Lingvo. Tiu sendube alportos sennombrajn profitigojn al ĉiuj, kiuj ĝin faros. Krome, iom post iom, la profesiuloj de la tuta mondo unuiĝos per iu pli granda konscienco pri la egaleco. Tio eĉ fariĝos en plibonaj konsekvencoj post kelkaj malproksimaj jaroj. Ni povas imagi pri la rompadado de rezisto kaj kontraŭstaro de la entreprenoj tra la mondo, kaj ilia akceptado de Esperanto en siaj medioj, farante, do, nur unu komunikila lingvo inter ili. La homoj uzos la Lingvon kaj samtempe lernos pri ĝia frateca idealo kiun gvidas ĝian ekzisto ekde ĝia komenco.

La uzado de pli praktika Esperanto, inkluzive en la komercaj rilatoj, neniam forgesante ĝian idealon, ne estos kontraŭ tio, kion Zamenhof kredis kaj, sekve, ne kontraŭ la propra esenco de la Internacia Lingvo. Ni ne putrigos nin pro tio, ke ni pragmatike uzas Esperanton. Ni ne makulos nin nur pro la fakto, ke ni volas esti pli profesiaj. Ni ne malpli niveligos nin pro tio, ke ni faras komercajn negocojn, kiuj profitigas ambaŭ flankojn de la rilatoj, uzante Esperanton.

Zamenhof ankaŭ diris: "VENOS IAM LA TEMPO, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur

lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo - vi ĉiuj sentas ĝin tre bone - estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj" (Malferma diskurso de la 2a. Universala Kongreso).

Tiu ĉi Antaŭprojekto konscias pri la interna idealo, kiu vivigas Esperanton kaj nin mem. Ĝi ne nur intencas proponi pli unu projekton por la disvastigado de Esperanto, sed proponi krei efikajn rimedojn por ke ĉiaj fakuloj kaj teknikistoj povos uzi la Lingvon en siaj profesioj kaj komercaj rilatoj.

La celo, do, estas iri alian vojon. La disvastigado ĉiam komencis per la idealismo kaj frata ideo kaj foje finiĝis en iu faka uzado. Tiu ĉi Antaŭprojekto intencas komenci per la faka uzado de la Lingvo, sed montrante, iom post iom, la fratecon kaj la idealon de Esperanto. La homoj estos surprizitaj kiam ili vidos, ke Esperanto estas ilo per kiu ili povos gajni monon, sed ankaŭ per kiu ili povas paroli al aliaj homoj en egala, frata kaj libera kondiĉoj.

---

## Paŝoj

### 1. Tradukoj de teknikaj normoj

Tiu ĉi Antaŭprojekto estas dividitaj en kelkaj paŝoj por atingi sian celon proponatan. La unua paŝo temas pri traduko de teknikaj verkoj, sed ne eblas facile kaj simple traduki ilin, sen la internaciaj normoj kiuj regulas la diversajn teknikajn kaj fakajn laborojn tra la mondo.

En la mondo ekzistas diversaj teknikaj normoj, nome ISO (International Standard Organization - Internacia Organizo por Normigo), DIN (Deutsches Institut für Normung - Germana Instituto por Normigo), JIS (Japan Industrial Standards - Japania Industria Normigoj), ASTM (American Society for Testing and Materials - Usona Socio por Eksperimentoj kaj Materialoj), ABNT (Associação Brasileira de Normas Técnicas - Brazila Asocio por Teknikaj Normigoj) ktp.

La simpla traduko de iu ajn teknika aŭ faka libro ne povas esti fareda sen la gvido de la teknikaj normigoj, kiuj regas la diversajn fakojn kaj areojn de la kono. Tio estas afero tute komprenebla, ĉar teknikaj libroj, kiuj traktas pri gravaj temoj inter la teknikistoj kaj fakuloj, ne povas esti arbitre verkita, sen atento de la internaciaj normoj, kiuj regulas ilin.

Sed traduki la diversajn internaciajn normojn, kiuj ekzistas sur la Tero, estas afero preskaŭ neatingebla, ĉar ili estas tro multe, kaj ekzistas multaj da Asocioj kiu regulas la normojn laŭ la landoj, regionoj, fakoj ktp. Ni devos elekti tiujn, kiuj estas la plej

internaciemaj inter ili, kaj ekde ties tiujn normerojn, kiuj estos la fokuso de la unuaj tradukadoj.

Ekzemple, se ni komencos la projekton per la tradukado de Mekanika Inĝenierarto, ni devos antaŭe traduki la normojn, kiuj korespondas al tiu fako, sed elektante unu aŭ du internaciajn asociojn, kiuj traktas pri ĝi (ekz.: ISO kaj DIN).

Tiu paŝo estas tre grava por la sukceso de la teknikaj tradukoj, ĉar la normoj, kiel la propra nomo jam eldiras, regulas kaj normigas la laboron, ne permesante, ke arbitraj konsekvencoj okazos kaj atendante la serĉesploron de la teknikistoj kaj fakuloj.

## 2. Tradukoj de teknikaj libroj

Por tiu paŝo, oni necesas teamon de tradukistoj. Ni surbazu je la modernaj tradukoficejoj, kiu funkcias fizike kaj virtuale, dungante tradukistojn en iu ajn parto de la mondo, sufiĉe ke ŝ/li estu alligita al Interreto. Nia klopodo devos esti ankaŭ tiu, nome la laboro kun teamo de tradukistoj en la virtuala reto.

Efikaj kaj ne-kostaj iloj jam ekzistas en Interreto por la tradukistoj. Ili povos utiligi la babilejajn ĉambrojn, la diskutretojn, la virtualajn vortarojn ktp. Tamen, iu pli grava afero estas la konstruado de granda vortaro en Esperanto, kiu enhavus preskaŭ ĉiojn el la teknikaj areoj.

Teknikaj kaj fakaj vortaroj en Esperanto jam ekzistas. Sed ili estas disaj, kaj dividitaj laŭ siaj fakoj. Necesas, ke la teamo respondecos por la kreado de unu vortaro, kiu enhavos ĉiajn fakajn kaj teknikajn vortojn.

Tiu teamo ankaŭ respondecos por la kreado de tian vortaron en la Interreto, ĉar la novaj vortoj, kiuj aperos dum la laboro, devos esti disponebla al ĉiuj, kiuj ilin necesos. Simila virtuala vortaro jam ekzistas por la eŭropanoj: vidu <http://europa.eu.int/eurodicautom/login.jsp>. Ĝi estas tre utila al la tradukistoj, ĉar ĝi enhavas ne nur vortojn en diversaj lingvoj, sed ankaŭ ekzemplojn de praktikaj uzadoj de la serĉataj vortoj per eltiraĵoj de oficialaj tradukoj jam faritaj en Eŭropa Unio. Tio ideo devas esti ankaŭ fareda en Esperanto.

## 3. Kontakto kun presejoj

En la komenco, nur la presejoj kiuj jam publikigas librojn en Esperanto devas esti kontaktata. La razono estas evidenta por si mem: aliaj profesiaj presejoj (McGraw Hill, Campus ktp) ne scias kaj ne komprenas ankoraŭ la povon de Esperanto, kaj ili ne akceptos teknikajn librojn presotaj en Esperanto. Tio nur okazos kiam Esperanto fariĝos lingvo de rezultoj (kaj por rezultoj, en ĉi tiu Antaŭprojekto, oni komprenas la sumon en mono, kiu esprimas la realigitan laboron farita de iu ajn profesiulo).

Presejoj alligitaj al religiaj aferoj ne povos publikigi teknikajn librojn. Ĝenerale, la religioj abominas la gajnon kaj la profiton; ili havas alian fokuson, kiu ne estas tiu de la Antaŭprojekto. Por ne miksiĝi la aferoj, estas preferata ne uzi tiajn presejojn. Sed

kiel veraj Esperantistoj, ni ne diskriminaciu nek estu raciismaj. Se ili volonte sin ofertas por la publikado de la tradukoj, ni devas akcepti ĝin kondiĉe ke la kvalito estas kompetentema.

Por ni, Esperanto estas ilo, kiu povas revenigi profiton. La honesta kaj sincera laboro meritas ricevi iun pagon, precipe ĉar se tiu laboro servos la evoluadon de la socioj, de la komunumo kaj de la landoj. La personoj, kiuj estos la finaj ricevantoj de la produktoj devenontaj de ĉi tiu Antaŭprojekto – niaj Klientoj –, ankaŭ profitos en siaj profesiaj vivoj. Ĝi estas simpla rilato profito-profitito; ni profitas, kaj ili ankaŭ.

#### 4. Trejnado de profesiaj parolantoj

Tiu ĉi Antaŭprojekto celas profesie agadi per Esperanto. Pro tio necesas, ke personoj estos preparitaj por prelegi, instrui, kunveni, seminarii, realigi metiejojn ktp, uzante Esperanton. La homoj nur observos, ke la uzado de la Internacia Lingvo dum tiaj okazoj ne estos, kiel ni jam menciis, rekte kaj eksplicite ideologia.

Profesiuloj de diversaj areoj de la kono, kiuj parolkapablas Esperanton, estos trejnataj por prelegi kaj por instrui siajn profesiajn konojn en la Internacia Lingvo. Ili fariĝos profesiuloj, kiuj povos esti invitetaj de iuj ajn entrepreno, komercaj agadoj, publikaj departamentoj, en iuj ajn lokoj de la mondo. Ili certe estos “globaligitaj” profesiuloj, kaj ili profitos per tiu. Ankaŭ Esperanto profitos, ĉar ĝi estos uzata en ĉiuj areoj de la ekzisto de la homo, same kiel la Iniciatinto revis.

La trejnado estos dividita en du partoj:

- ☞ lerno kaj asimilado per Interreto, uzante komunikajn softvarojn (*ICQ, PalTalk* ktp), kaj diskutlistojn (*Yahogroups, Nossogrupo, Meugrupo* ktp) por sendado de la lecionoj, interŝanĝoj de ideoj kaj opinioj, kaj virtualaj kunvenoj dum certaj kaj specifigitaj horoj de la semajno;
- ☞ la partoprenantoj renkontiĝos okaze de internaciaj eventoj, kiel la Universalaj Kongresoj, aŭ, en pli nacia grado, en kunvenoj anticipe aranĝitaj. Tiuj kunvenoj por trejnado estos farendaj en altnivelaj hoteloj (5 aŭ 4 stelaj hoteloj), kun daŭro de 8 al 16 horoj (1 aŭ 2 tagoj). La fokuso estas atesti ilian kapablon prelegi aŭ instrui pere de praktikaj ekzercoj, mallongaj prelegoj kaj prezentadoj de sukcesaj kazoj.

Ni ne povas prezenti cifrojn nek pri la unua, nek pri la dua parto de la trejnado. Sed ni povas aserti, ke tiaj eventoj estas profesiaj, kaj pro tio estas, ke ili ne devos esti konsiderata kiel simpla Esperanto kurso, unue ĉar ĝi ne estas kurso por Esperanto, due ĉar ni laboras pragmatike kaj celante la altan profesian kvaliton, kiu turniĝos en profito (en diversaj sencoj).

Tiu estas la pinto, kiun ni volas atingi. Montri al ĉiuj en la mondo, ke Esperanto servas por ĉio, eĉ por profesiaj aferoj. Ni neniam forgesos la internan ideon, kiu gvidas Esperanton en la mondo, sed ni ne eksplicite disvastigos ties ideologion; por tion fari, ni pruvos montri la efikon kaj la facilecon de Esperanto. Plue: ni povos

montri kiel honeste kaj profesie profiti uzante ilon, kiu jam estas atestita kiel la plej facila en la mondo.

---

## Leksikono

Komprenoble, kiam oni partoprenas en prelegoj, metiejoj, seminarioj kaj lernado de iu ajn profesia afero, oni multe uzas vortojn de eksterlandaj lingvoj. Esperanto, kiel vivanta lingvo, estas natura, kaj komprenoble ĝi ankaŭ ricevas influon de aliaj lingvoj por esprimi certajn ideojn. Kiel uzantoj de la Lingvo, ni ne ignoru la fakton, ke kelkaj nacie devenataj vortoj uzataj en la entreprenaj, teknikaj kaj fakaj areoj jam internaciigas kaj multaj el ili devenas el la angla lingvo.

Sed kiel Esperantistoj, kaj gardantoj de la Interna Ideo, ni observos la uzadon de tiuj eksteresperantaj vortoj, kaj per logiko kaj neŭtraleco ni esperantigos tiujn vortojn. La Internacia Lingvo permesas la konstruadon de vortojn, kiuj enhavos la propran sencan de la originalaj vortoj. Ekzemple ni vidas la vorton "metiejo", kiu estas uzata tie ĉi kiel traduko de *workshop*. Ambaŭ vortoj signifas lokon, kie la personoj trejnos siajn fakojn aŭ kontaktos aliajn fakulojn por plibonigi kaj interŝanĝi konojn kaj ideojn. Malgraŭ la fakto, ke la vorto *workshop* estas internacie rekonata, Esperanto ofertas la eblecon neŭtraligi ĝin, kaj la teknikistoj kaj fakuloj havos novan vorton por uzi, tute neŭtrala, egaleca kaj uzenda.

Ni devos memori ĉiam, ke la "krokodilado" ne povas esti permesata. Ĉiam, kiam ni trovos novajn vortojn ankoraŭ ne tradukitajn al Esperanto, ni observos la regulon de la konstruado de vorton, ankaŭ la jam tradukitajn internaciajn fakajn normojn, kaj tuje esperantigos ilin. Tiamaniere, ni montros al la homaro, ke Esperanto funkcias rapide, logike kaj, unufoje plu, neŭtrale.

---

## Konkludo

Tiu Antaŭprojekto estas la ilo por konkretigi la revon elparolitan de Zamenhof en la Dua Universala Kongreso, en Ĝenevo (vidu sube la vortojn). Ĉu ne estas ebla al ni profesie agadi per Esperanto kaj honeste profiti per ĝi? Ĉiu homo, kun ĉiaj idealismoj, povas kaj devas uzi Esperanton, se ĝi taŭgas por ili.

Sed se ni havas la kapablon paroli lingvon, kiu estas facila kaj facile komprenbla, tiel estu en sia skribata formo, same kiel en sia parolata formo, kial ne uzi ĝin por interŝanĝi ideojn kun homoj kiuj praktikas la samajn profesiojn? Tio jam okazas.

En tiu ĉi Antaŭprojekto, oni vidis la vorton “profito” diversajn fojojn. Ĝi devas esti komprenata kiel konsekvenco de iu honesta kaj entreprena afero, kiu alportas plibonigojn al la socio kaj al la homaro. Tiu estas koncepto de iu ajn entrepreno, kiu agas tiamaniere.

En la Entrepena Kulturo, oni instruas, ke la revoj devas esti grandaj, sed la paŝoj por ĝin atingi devas esti tre malgrandaj, solide kaj konscie paŝitaj. Per tiu defino, tiu Antaŭprojekto estos konkretiĝita nur en multaj da jaroj. Sed ni bezonas komenci labori nun, kaj tute ne gravas, kiu(j) ĝin finiĝos.

Antoine de Saint-Exupéry, la aŭtoro de “La Eta Princo”, estis aviadisto por la franca aera poŝto. Historio rakontas, ke kiam li flugis dum neĝa tempesto, lia aviadilo falis kaj li mirakle supervivis. Sed, kompreneble, li estis tro vundita pro la dispecigitaj partoj de la aviadilo, kiuj atingis lin dum la falo. La neĝo falis senĉese...

Kiel aviadisto, li uzis siajn konojn por certigi sin kie li estis, kaj ekvidis, ke urbo ekzistis en kelkaj kilometroj for de lia fala areo. Li reflektis pri la situacio iomete, kaj tuj ekkomencis sian malrapidan vojaĝon ĝis tiu urbo. La neĝo sekvis en senĉesa falo...

Ĉiuj scias, ke li supervivis ankaŭ al la vundoj kaj al la neĝo. Tion, kion ni ne scias, estas liaj vortoj rilate al tiu akcidento: “mi bone sciis, ke la urbo estis tre malproksima al mi, sed se mi pensus nur pri tio, mia kapo estus plenumita de tiu temo kaj mi frezeziĝus. Pro tial estas, ke mi nur pensis en fari la proksiman paŝon, malgraŭ la doloron en miaj kruroj: ‘nun mi devas fari tiun paŝon, nun mi devas fari alian paŝon ktp ktp’. Kaj kiam mi haltis por vidi kie mi estis, mi estis ĵus alveninta al la urbo kaj mi facile petis helpon.”

Lia “revo” estis atingi la urbon, sed se li pripensadis nur la urbon, eble li mortus kaj ni neniam legus lian faman verkon. Li preferis pensi konkrete kaj reale, kaj fari paŝon post paŝo, ĉar tiu estas tio, kion li nur havis en la momento.

Zamenhof diris ion tre interesa pri la afero Esperanta en sia prelego dum la inaŭguro de la Dua Universala Kongreso, en 1906, en Ĝenevo, Svislando. Li diris:

“Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo – vi ĉiuj sentas ĝin tre bone – estas frateco, kaj justeco inter ĉiuj popoloj”.

Esperanto nur atingos sian Finan Venkon, kiam la homoj povos sin dediĉi profesie, laborpage kaj ekskluzive al ĝi. Dum Esperanto estas nur aktiveco por neokupitaj horoj, por semajnfinoj, por hobia, ĝi ne atingos la revon de ĝia Iniciatinto.

Precipe nun, epoko plena je ekonomika krizo kaj nedungado, malmultoj da homoj, eĉ la idealistoj mem, povos dediĉi malgrandan parton de ilia tempo al Esperanto. Pro tiu ĉi fakto, la Lingvo Internacia perdas la laboron kaj forton de grandaj talentuloj de la Esperanto-movado.

La disvastigo de Esperanto okazas amatorece far altruismaj kaj idealismaj personoj, kiuj ofertas iliajn neokupitajn horojn por ĝi. Tiu idealista disvastigado atingas nur kelkajn personojn, kiuj estas egale idealistaj, sed ili ne korespondas al la bezonoj de 99% de la monda loĝantaro, kiu ne estas idealista, sed rekte-ancelisma kaj egoisma.

Eble, nia revo estas la revo de Zamenhof, kiu profete eldiris tiujn vortojn, jam vidante tian tempon, kiam la tuta homaro uzos Esperanton. Nia revo ĉi-momente similas tiun urbon vidinta de Saint-Exupéry: ni devas marŝi tuj, ĉar la neĝo falas...

**FINO**

Jundiaí-SP, la 17a de aprilo, 2002

Lucas Marcelo Ferretti Yassumura  
[ylucas@ieg.com.br](mailto:ylucas@ieg.com.br)  
Jundiaí, SP - Brazilo

## ALDONO – PROPONATA KRONOGRAMO POR LA ANTAŬPROJEKTO

Ordo	Paŝo	Limdato	Atingita
1	Redaktado de la Antaŭprojekto – 1a versio	31a dec. 2001	✓
2	Sendo de 1a versio al legantoj	4a jan. 2002	✓
3	Legado kaj komentarioj de la legantoj	25a jan. 2002	✓
4	Korektado, aldono, plibonigo kaj redaktado de la 2a versio	17a mar. 2002	✓
5	Serĉesploro de similaj agoj en la mondo	3a maj. 2002	
6	Kontaktoj kun personoj kun similaj ideoj en la mondo	5a jul. 2002	
7	Kolektado de financaj informoj por la Projekto	23a aŭg. 2002	
8	Korektado, aldono, plibonigo kaj redaktado de la 3a versio	20a sep. 2002	
9	Sendo de 3a versio al legantoj por komentarioj kaj kritikoj	4a okt. 2002	
10	Ricevo de komentarioj kaj kritikoj	25a okt. 2002	
11	Plibonigo kaj redaktado de la fina versio de la Antaŭprojekto	22a nov. 2002	
12	Prezentado de la Antaŭprojekto al BEL kaj UEA	13a dec. 2002	
13	Transformiĝo de Antaŭprojekto al Projekto	31a dec. 2002	

*Obs.: Tiuj paŝoj estas nur proponaĵo. Kompreneble, laŭ la kapablo kaj la kondiĉoj de la personoj envolvitaj en tiu ĉi Antaŭprojekto, ili ŝanĝigos la limdatojn de la paŝojn ankoraŭ ne atingitaj.*